

Numero: 252.
Majo: 2013.

21-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

La jaroj forflugas 01

Kvazaŭ hieraŭ estus okazinta, kiam mi ekkonis Esperanton. La jaroj, eĉ jardekoj rapide flugas kaj ni apenaŭ rimarkas ilin.

Estis somero kaj suno arde brilis. Mi estis lerneano proksimume dekdujara knabo. Dum la somera ferio mi vizitis nian vilaĝan bibliotekon kaj tie mi ekvidis strangan libron kun interesa, kolora kovrilpaĝo.

Komence mi ne sciis, pri kio ĝi temas. Atente mi komencis foliumi tiun libron. Iom mi trompiĝis, ĉar la libro estis lernolibro de ĝis nun nekonata lingvo.

Mi konfesas sincere, mi ne ŝatis lerni precipe dum la somera ferio. Tamen nun tia afero okazis, pri kio mi neniam ŝonĝis.

Ĉi lingvo vekis mian atenton. Mi pruntis la libron, kiun hejme mi montris al miaj amikoj Petro kaj Blazio.

Petron ne longe interesis la nova lingvo, sed mi kun Blazio, kiu estis ferianta knabo en nia vilaĝo ĉe avino, diligente ni lernis ĝin.

Du frenezaj knaboj, kiuj komencas lerni fremdan, ili sidis en malvarmeta ĉambro kaj lernas lingvon. Ankoraŭ estis malproksime la komenco de la nova lernojaro.

Tiel komenciĝis mia esperantista agado en Esperantujo.

Nia lingvoscio bele kaj rapide progresis, la novaj vortoj gluis al ni kaj post iom da tempo ni jam povis fari simplajn frazojn. Ni ĝuis la sukceson. Ni kiuj apenaŭ povis ellerni la rusan en la lernejo, nun ni lernis strangan, interesan lingvon, pri kiu ni apenaŭ sciis ion.

Ĝi tre plaĉis al mi, ĉar post la rusa lingvo Esperanto estis facila, rapide ellernebla. Krome ni mem elektis tiun ĉi lingvon.

Gaje, lernante pasis la restintaj tagoj de la somero. Ni lernis ĉiutage, kaj tiu ĉambro iĝis nia sanktejo.

En mia vivo tie komenciĝis io, pri kio mi sciis nenion tiam.

Verdire en septembro mi devis forlasi la lingvolernadon, ĉar pro la nova lernojaro min atendis aliaj lernobjektoj. Tiu ĉi paŭzo daŭris nur kelkajn jarojn, sed tio estas alia historio.

En la sekva numero de Vesperto mi daŭrigos miajn travivaĵojn en Esperantujo.

-Redaktanto-



Ki estas la plej valora lingvo?

Du knabetoj babiladas en la sablejo.

-Mia paĉjo parolas la anglan lingvon kaj ankaŭ mi lernos ĝin, se mi estos granda knabo. Ĝi estas la plej valora lingvo en la tuta mondo.

Lia amiko eklevas sian kapon kaj li mire demandas:

-Ĉu via paĉjo parolas nur la anglan lingvon?

-Jes. Ĝin li povas uzi ĉie. La angla lingvo estas parolata en ĉiu lando de Tero.

-Ja, nun ni parolas en alia lingvo. Mi kaj eĉ vi ankoraŭ ne scias tiun ĉi lingvon. Ĉu ne?

-Vi pravas. Ni ankoraŭ ne parolas ĝin. Sed kiel mi menciis, kiam mi fariĝos granda knabo ankaŭ mi ellernos la anglan lingvon. Laŭ mi ankaŭ viaj gepatroj proponos al vi ĝin, ĉar ĝi estas la plej valora lingvo en la mondo.

La alia knabeto ekridetas kaj li kapneas:

-Mi neniam ellernos la anglan lingvon. Mia paĉjo kaj panjo parolas la germanan lingvon. Laŭ mi ĝi estas pli valora ol la angla.

-Hihi, ĉu vi parolas ĉi lingvon?

-Jes. Per ĝi ni povas komuniki en multaj landoj. Ni uzas ĝin ofte ankaŭ hejme, ĉar sciu, mia paĉjo estas germana kaj mia panjo estas hungara. La germana estas la plej valora lingvo.

La du knabetoj ne povas interkonsenti. Ĉiu opinias, sia lingvo estas la plej valora.

Ĉe la flanko de la sablejo ilin atentis blonda knabineto. Longe ŝi diras nenion. Ŝiaj okuloj brilas, kiel ŝi rigardas ilin. La knabetoj ne rimarkas ŝin. Ja, ŝi estas nur knabino, kaj ili estas knaboj, kiuj diskutas pri grava temo.

Aprubte la knabineto ekstaras kaj ŝi alpaŝas la knabojn.

-Mi aŭdas, ke vi diskutas, kiu estas la plej valora lingvo.

-Nu kaj? – ili ekmiras – Ĉu vi scias?

-Ĉu vi aŭdis pri Esperanto?

-Esperanto? Kio ĝi estas? Ni nun parolas pri lingvoj.

-Ankaŭ mi parolas pri lingvo.

-Ĉu? Pri kia lingvo? – ili demandis samtempe la knaboj – Ĉu ekzistas tia lingvo?

-Jes. Esperanto estas internacia lingvo kaj ĝi estas ĉies lingvo.

-En kiu lando ĝi estas parolata?

-En ĉiu lando en la tuta mondo kaj ĝi estos la dua gepatra lingvo de la homaro.

-Ĉu tia lingvo ekzistas en la mondo? – demandas la knabetoj kaj mire rigardas la knabinon, kiu mistere ridetas.

-Ŝaŝa-

Vilaĝa vivbildo

-Fragmento-
(Sonkoly Éva)

SinJORINO Kata agrable okupis lokon sur la kuireja seĝo kaj ŝi malrapide eklevis denove la ovon tenante ĝin en la lampolumon por ekzameni, ĉu ĝi estos taŭga meti sub la kovantan kokinon.

-Rigardu, en la diablo, kiel ĝi povas okazi? – ŝi turnadis la ovon, sed ŝi ne vidis, kio estis serĉata.

La mastro György ĝuste staranta antaŭ la fridujo por ke li elprenu denove botelon da vino.

-Kio estas la problemoj? – li rigardis tien kvazaŭ la afero interesus lin, sed per siaj okuloj li serĉis la plej grandan glason por la vino.

-Mi ne komprenas. Rigardu, ĉu mi vidas ĝin bone. Ĝi havas nenian kernon – ŝi metis la ovon antaŭ sian edzon.

-Ĝi ne estas pruno, ke ĝi havu kernon – murmuris la dommastro, poste li eltiris botelostopilon kaj li plene verŝis la vinon en la glason.

„Jam pasintjare mi diris, ke ni devus ŝanĝi ĉi tiun sentaŭgan kokon” – pensis la virino.

-Kion meti sub la kovantan kokon? – ŝi grumblis laŭte.

-Ni eĉ ne havas kovantan kokinon, nur kapanon – rigardis al ŝi la edzo de apud la vinbotelo.

Tiel estas, vi bone scias, sed la koko Gyuri povus esti ankaŭ pli diligenta ĉe la kokinoj, nun mi ne devus iri najbaren.


-Vi brakumadas nur la vinbotelon dum la tuta vintro – ŝi rigardis al la glaso de sia edzo.

-Mi jam estas maljuna por brakumadi alian.

Nu ja se li aŭdus tion... - kaŝis la buŝon de la sinJORINO per sia mano, ĉar ŝi ne ŝatis la rapidmovan manon de sia edzo, krome vivi en paco estas pli agrable.

(tradukis: Apáti Kovács Béla)

Kara Leganto, se Vin interesas la fino de ĉi noveleto, bonvolu skribi al mi kaj mi tradukos ĝin.



Pri imaga vojaĝo

-Fantasta rakonto-
IX.

Ni eniris la palacon, ĉar la konstruaĵo estis tio. Ĝi estis bele instalita kaj ĉie brilis la pureco. La servistoj, kiel en la ŝipo afable salutis min. Tio ĉi pli bone frakasis min. Mi sentis, ke baldaŭ mi frenezigos, se oni ne malkaŝos sincere, kio okazis al mi.

La grafo Bonfarulo plu estis mistera. Li apenaŭ alparolis min. Ni iris tra longaj, agrable odoraj koridoroj mute. Vere foje – foje li diris al mi kelke da bagatelaj vortoj aŭ frazoj.

-Trankviliĝu! Ne estu nervoza! Vi estas en bona loko. Vi ne devas timi.

Se kolektante mian kuraĝon kaj demandis ion, li tuj respondis krute:

-Ĝustatempe vi ekscios ĉion.

En la palaco krom la servistoj mi vidis nenium. Mi ne sciis, kien mi estas gvidita. Mi sincere konfesas, mi timis, sed aliflanke mi estis ege scivola.

Post longa piediro ni alvenis gigantan salonon, kie ĉio estis el oro laŭ mi. La grafo Bonfarulo proponis sidiĝi al mi en la proksiman veluran fotelon.

Denove mi restis sola. La grafo foriris, sed de la pordo li returnis sin kaj diris ridetante:

-Ne maltrankviliĝu! Baldaŭ mi revenos kaj tiam vi ekscios ĉion pri mia plano.

Nelonge mi restis sola en la salono. Post la foriro de la grafo Bonfarulo maljuna, blankvesta viro envenis, kaj sidiĝis apud min.

-Salut'! – li salutis min kaj amikeme alrigardis min. – Ĉu ankaŭ vin la sinjoro grafo Bonfarulo invitis ĉi tien?

-Mi venis kun li – mi balbutis kaj mi forgesis resaluti. Mi estis konfuzita. Mi ne sciis kiu estas tiu ĉi oldulo.

-Ĉu vi estas la amiko de la sinjoro grafo Bonfarulo? – li demandis mire.

-Oni povas diri ankaŭ tiel, – mi respondis – sed mi nelonge konas lin. Kiu vi estas sinjoro?

-Pardonu min pro la malĝentileco, mi forgesis prezentiĝi. Mia nomo estas Esperulo. Ĉu vi?

-Mi estas Georgo Bánhidi.

-Ĝi estas stranga nomo. Laŭ mi vi estas nelonge sur la insulo. Ĉu ne?

-Prave, antaŭ kelkaj horoj mi alvenis.

-Ho, ankoraŭ vi estas novulo. Post kvincent jaroj ankaŭ vi alkutimiĝos la ĉi tiean vivon. Mi jam depost sepcent kvin jaroj vivas sur la insulo.

Min surprizis lia respondo, kaj nun jam efektive komencis timi.

(daŭrigota)

Poezio

Mia penso

Sur la kampo for de l' mondo,
antaŭ nokto de somero,
amikino en la rondo
kantas kanton pri l' espero.
Kaj pri vivo detruita
ŝi rakontas kompatante, –
mia vundo refrapita
min doloras resangante.

"Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro,
kial tia senmoveco?
Ha, kredeble rememoro
el la kara infaneco?"
Kion diri? Ne ploranta
povis esti parolado
kun fraŭlino ripozanta
post somera promonado!

Mia penso kaj turmento,
kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
al vi iris jam oferoj!
Kion havis mi plej karan –
la junecon – mi ploranta
metis mem sur la altaron
de la devo ordonanta!

Fajron sentas mi interne,
vivi ankaŭ mi deziras, –
io pelas min eterne,
se mi al gajuloj iras...
Se ne plaĉas al la sorto
mia peno kaj laboro –
venu tuj al mi la morto,
en espero – sen doloro!

L. L. Zamenhof



Poezio

Pluvo

Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas
senĉese, senfine, senhalte,
el ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'
are gutoj frapiĝas resalte.

Tra la sonoj de l' pluvo al mia orelo
murmurado penetras mistera,
mi revante aŭskultas, mi volus kompreni,
kion diras la voĉo aera.

Kvazaŭ ia sopir' en la voĉo kaŝiĝas
kaj aŭdiĝas en ĝi rememoro...
Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj ĝoja,
en mi batas konfuzo la koro.

Ĉu la nuboj pasintaj, jam ofte viditaj,
rememore en mi reviviĝis,
aŭ mi revas pri l' sun', kiu baldaŭ aperos
kvankam ĝi en la nuboj kaŝiĝis?

Mi ne volas esplori la senton misteran,
mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;
ion freŝan mi sentas, la freŝo min logas,
al la freŝo la koro min tiras.

L.L. Zamenhof



Por infanoj

La katido de Manja



En nia najbaro estis knabineto Manja. Ŝi tre ŝatis la bestojn. Kun sia avino ŝi ĉiam estis en la kortobirdejo kaj ŝi helpis al la maljunulino nutri la kokinojn, anasojn kaj aliajn bestojn.

La avino tre ĝojis pro la helpo. Ŝi jam estis ege maljuna iri tien – reen en la korto. Tial Manja volonte plenumis ŝian peton. Se estis necesa, ŝi donis trinkakvon al la bestoj aŭ purigis la kokinejon.

Ŝi estis vere bona knabineto, pri kiu ĉiu avino povis revadi.

En iu tago la onklo de Manja donacis al ŝi ĉarman katidon. Li diris:

-Mi aŭdis de via avino, ke vi helpas al ŝi multe en la domlaboro, tial mi alportis por vi katidon. Vi fariĝu bonaj amikoj!

Manjan surprizis la donaco. Ŝi jam delonge volis tian katidon. Ŝi tuj nomis ĝin Mirci.

Ankaŭ la kato rapide ekŝatis la knabinon. Ĉien ĝi akompanis ŝin.

Ĉiutage Manja donis al ĝi freŝan, malvarmetan lakton, kion la besto feliĉe konsumis. Poste sekvis dolĉa dormado sur la maljuna tapiŝo de la avino.



Do la malgranda besto havis reĝan lokon en la domo. La homoj dorlotis ĝin. Manja ludis kun ĝi, kion la katido ege ĝuis. Ĝi fariĝis la favoratulo de la domanoj.

Kiel la katido kreskadis, tiel ĝi iĝis pli scivolema. Komence sufiĉis por ĝi ekkoni la ĉambrojn kaj la kuirejon. Kiam jam ĝi malkovris ĉiun ejon en la domo, ĝi deziris fari ekskurson ankaŭ al la korto kaj ĝardeno.

Oni neniam lasis sola la katidon sur la korto, ĉar tie vivis ankaŭ granda, blanka domgardisto, la hundo.

Ĉiu scias, hundoj ne tro ŝatas la miaŭantajn bestojn. Ili estas eternaj malamikoj.



Malgraŭ ĉiu atento en iu mateno Cirmi forlasis sian hejmon kaj ĝi ekiris malkovri ankaŭ la eksteran mondon.

Ĝi jam plurfoje estis sur la korto aŭ en la ĝardeno, sed tiam ĉiam kun la knabino, kaj ĝi ne estis en danĝero. Tiam la hundo estis forigita, kaj estis malproksime de ĝi.

Ankaŭ nun ĝi kuraĝe paŝadis sur la vojeto inter la belegaj floroj kaj ĝuis la liberan vivon. Ĉio tre plaĉis al ĝi. Ĝi ne rimarkis, ke sia promenado vekis la atenton de la hundo kaj la timiga besto furioze ekiris post la katido.



Jam ĝuste la hundo volis kapti ĝin, kaj la vivo de Cirmi estis en danĝero, kiam en la lasta momento bonŝance la avino iris korten kaj savis ĝin.

-Pajtas, for de tie! Ne molestu la katidon de mia nepino!

Je tio la hundo haltis kaj ĝi malgaje rigardis per siaj okuloj kvazau ĝi estus dirinta: „Kara avino, kial vi ne lasas min ludi per tiu besto?”

La kriado eligis ankaŭ Manjan el la domo, kiu ektimigante kuregis al sia ŝatata katido kaj diris:

-Dankegon avino mia, kial vi savis mian etan amikon.

-Onklo Adalberto-

Majaj bildoj



Majaj bildoj

